


LA JUNULO VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

LA REĜO DE LA ALIGATOROJ.

(Rakonto de Pat Aptich, tradukita de amiko Petro dank' al la afabla permeso de la grava belga junulargazeto „Spirou”. Ĉi tiu rakonto estis elsendata de la Franca Radio dum la unua junular-elsendo, la 21-an de okt. '48).

„Joe, vi tro maltimas. Ĉam ili venĝos sin.”

Sed Joe ridetas sub sia nigra hararo.

„La sango de la „conquistadores”¹⁾ fluas en miaj vejnoj. Ili scias tion. Baldaŭ mi estos ilia reĝo. La reĝo de la aligatoroj de Maraja.”

La unuan fojon, kiam mi ekvidis la Marajo-insulon, ĉe la enfluejo de la riverego Amazono, mi kredis, ke mi ĵus retrovis la surteran paradizon. Sed post kiam mi iris kvar paŝojn ekster la „casas”²⁾ mi sciis, kia estas la infero.

Imagu tiom grandan insulon, kiom la kvarono de Britujo, meze de la plej granda riverego de la mondo kaj plenplenan de ĉiaj krokodiloj kaj aligatoroj, kiuj per unu maĉo povas rompi la post-aĵon de bovino.

¹⁾ Konkerantoj, la hispanaj aventuristoj, kiuj konkeris Amerikon.

²⁾ Kabano de indiĝeno.

Mi ripetas: la infero. Oni ne plu revidos la infanon, kiu forkuris el la „casas”. Sub la arbustaroj ĉe la rando de la vilaĝo ripozas ĉiam tri aŭ kvar dormantoj. Ili dormas ĝis kiam la senprudentulo estas proksime al ili. Subite ili ĵetas sin sur la knabon kaj li eĉ ne plu havas la eblecon por krei „Panjo!” En la riveroj de la insulo svarmas la skvamaj dorsoj kaj la pintdentaj makzeloj.

Kaj Joe, tiu fanfaronulo, volas fariĝi ilia reĝo. Pli ĝuste: ilia manĝaĵo, jes!

Sed Joe fidas al si mem.

„La krokodiloj? Ili respektas min. Ili ne kuraĝus vundi min. Venu morgaŭ! Vi vidos

La sekvan tagon, ĉirkaŭ la tagmezo, ni estas ĉe la bordo de la rivero. Sur la akvo naĝas dekoj da krokodiloj.

„Oooooiuuuii!” Joe provokas siajn kontraŭbatalantojn. Tri viroj, kun li, ŝvingas kaptoŝnurojn, dum alia ĵetas pecojn da viando proksime al la riverbordo. Bestoj rapide alproksimiĝas. Tiam la kaptoŝnuro de Joe siblas tra la aero kaj ĝuste venas ĉirkaŭ la kolon de dudek du metrojn longa aligato. Jam ni ĉiuj estas ĉe la knabo kaj tiras furioze por devigi la beston eliri el la akvo. Dume Joe prenas hakilon kaj elasta kiel „anaconda”³⁾ li klopodas alproksimiĝi al la besto. La aligato furioze baraktas; ĝia vosto tranĉas la aeron; ĝi mortigus ĉiujn, kiujn ĝi atingus. Ĉe la unua bato la hakilo resaltas sur la malmola kranio. Joe flankensaltas por eviti la makzelojn. Tuj li reatakas kaj lia bato trafas la krokodilon sub la okuloj kaj krevigas la tutan kranion. Nia unua viktimo baldaŭ faras la lastan spiron.

Sed Joe interesiĝas nur pri vivantaj bestoj. Lia kaptoŝnuro jam atingis junan krokodilon, dek metrojn longa.

„Rigardu!” li krias, kaj li kuras al la besto, kies sangoruĝaj okuloj montras la koleron.

„Joe, la hakilo!” ni krias pro timo. Li estas sen armiloj kontraŭ la aligato. Sed li ridas: „Mi kaptos ĝin per nudaj manoj.”

Reciproke ili observas sin, la homo kaj la besto. Li kun ridantaj okuloj, ĝi kun gorgo ŝvelita pro furiozeco. Subite Joe eksaltas, evitas la voston kaj fine troviĝas sur la skvama dorso. Liaj du manoj firme tenas la malsupron de la makzelo, kiu enhavas la grandajn dentojn. La vosto falĉas la aeron, sed Joe platigas sin sur la dorso de la besto por eviti ĝin. Li ne klopodas gorgpremi ĝin. Li parolas al ĝi, sed samtempe karesas ĝian gorgon kaj liaj du ridantaj okuloj rigardas ĝisfunde en la ruĝajn okulojn de la krokodilo. Estas la aligato, kiu unue fermas la okulojn.

³⁾ Granda serpento, kiu vivas sur la bordoj de sudamerikaj riveroj.

Jen la komenco de la granda fiero de Joe. Li ne mortigis tiun aligatoron, sed tenis ĝin en ĉirkaŭbarita korto. Ĉiutage li saltis sur ĝian dorson, karesis ĝian gorĝon kaj rigardis ĝin rekte en la okulojn, murmurante amazonajn vortojn, kiajn la patrino flustras al sia bebo.

Baldaŭ estis kvin aligatoroj en la korto de Joe. Tuj kiam li eniris, ili rapide alproksimiĝis por ricevi karesojn. Joe seninterrompe rigardis ilin rekte en la okuloj kaj kolombumis pro kontenteco kaj fierego.

„Mi jam diris tion al vi. Sufiĉas, ke mi alvenu por malkolerigi ilin. Ili eĉ ne pensas pri atako.”

Estas daŭrigota.

LA EMINENTA FREMDULO. (R. L. Stevenson)

Iam vizitanto el najbara planedo venis al la tero. Renkontis lin mondfama filozofa, kiu havis la honoron montri al li ĉion.

Unue ili trairis arbaron. La fremdulo rigardis la arbojn.

„Kiun mi vidas ĉi tie?” li diris.

„Ho, ili estas nur vegetaĵoj,” diris la filozofa; „ili ja vivas, sed ne estas interesaj.”

„Mi ne estas tiel certa,” dube respondis la fremdulo; „al mi ŝajnas, ke ili tre bone kondukas. Ĉu ili neniam parolas?”

„Mankas al ili la kapablo,” diris la filozofa.

„Tamen, mi aŭdas ilin kanti, ĉu ne?” diris la alia.

„Tio estas nur la vento inter la folioj,” diris la filozofa; „mi klarigos al vi la teorion pri ventoj. Ĝi estas tre interesa.”

„Nu,” meditis la fremdulo, „mi ja scivolas pri kio ili pensas.”

„Ili ne povas pensi,” diris la filozofa.

„Ne trompu vin pri tio,” rediris la fremdulo; „mi tre ŝatas ĉi tiujn homojn,” li aldonis.

„Sed ili tute ne estas homoj,” diris la filozofa. „Venu!”

Poste ili trairis kampon, kie estas bovinoj.

„Jen tre malpuraj homoj,” rimarkis la fremdulo.

„Ankaŭ ili tute ne estas homoj,” diris la filozofa; kaj li klarigis, kio estas bovino en terminoj, kiujn mi forgesis.

„Tion mi ne komprenas,” diris la fremdulo; „sed kial ili neniam rigardas supren?”

„Ĉar ili estas herbmangaj,” diris la filozofa; „kaj nutri sin per herbo postulas tiom da atento, ke tempo mankas por pensi, paroli, rigardi la pejzaĝon aŭ eĉ purigi sin.”

„Nu,” diris la fremdulo, „oni eble povas vivi tiumaniere, sed mi preferas la homojn kun la verdaj kapoj.”


Ili poste alvenis ĉe la urbo. En la stratoj estis amasoj de viroj kaj virinoj.

„Jen tre strangaj homoj,” diris la fremdulo.

„Ili estas la homoj de la plej granda nacio en la mondo,” fieris la filozofo.

„Ĉu vere?” mire diris la alia; „ili apenaŭ donas tiun impreson.”

Trad. L. G. Watson, Britujo.



IJK-Rubriko. Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veen-
dam, Nederl. — Centra Informejo de IJK: Einar
Dahl, Uddevalla, Svedujo.

Raporto pri la instruistaj kunvenoj en la T.J.O.- Kongreso en Versajlo, 1949.

Okazis du kunvenoj kaj mi kunmetas ilin en ĉi tiu raporto por neteco. F-ino Jeanne Dedieu donis raporton pri la instruista seminario en Angoulême, kiun ĉeestis 13 personoj.

Ili streĉe laboris, tamen multe profitis en feliĉo kaj lingvo-scio. F-ino Dedieu bedaŭras, ke la frua dato de la seminario estas neoportuna por tiom da alilandanoj. Si poste aludis la oficialan parigon de anglaj kaj francaj lernejoj kaj demandis: „Kial

ne ankaŭ por Esperanto-studentoj?” S-ro Hamilton certigis ŝin, ke ne estus eble pro la nuna sinteno de la edukaj aŭtoritatoj, kiuj en la plej bona okazo estas neŭtralaj, sed pli ofte malfavoraj. La lernejestro havas la rajton enkonduki Esperanton, sed li tamen faras grandan riskon.

S-ro Lentaigne (Balaruc les Bains, Hérault, Francujo), kiu reprezentas la francan pedagogian movadon „Freinet”, proponis, ke ni utiligu ties metodojn por Esperanto.

La movado instigas la presarton en lernejoj kaj grupinterŝanĝon de revuoj, verkitaĵoj kaj presitaj de la lernantoj; oni interŝanĝas ankaŭ diversajlojn kiel florojn, bildojn, pentraĵojn. La movado viciĝas kun la novaj eduk-metodoj kaj ĉi tia vivanta, aktuala grupkorespondado estas ĝuste la ilo por Esperanto-instruistoj. S-ro Lentaigne jam kontaktigis lernejojn en multaj landoj kaj li ekspoziciis por ni materialon ricevitan de Brazilo, Urugvajo, Aŭstralio, Nederlando, Japanujo, Norvegujo kaj aliaj landoj. La ideo estas aplikebla ankaŭ inter diverslandaj instruistoj, kiuj mem scipovas Esperanton, sed eble ne rajtas instrui ĝin. La materialo havos Esperantan tekston kaj sur la klaseja muro la infanoj **vidos** la rezultatojn kaj konstatos la utilecon de la lingvo por si mem. S-ro L. spertis, ke la infanoj venas al li, petante, ke li instruu al ili la lingvon. Do la ordinara sinteno estas renversita. La infanoj babilas pri la afero en la hejmo. Inspektoroj vizitas kaj nepre konvinkigas. Tiel la ideo helpas al nia celo de „Esperanto en la lernejo” kaj samtempe alportos por la infanoj aktualan, internacian atmosferon, kiu certe ĝojigos ilin.

S-ro L. akcentis, ke ĉi tiu ideo ne anstataŭis **individuan** korespondadon, sed ĝi preparas la teron kaj semas por estonta rikolto. Por ke ĝi sukcesu, estas necese nur, ke la du instruistoj mem bone scipovu Esperanton, por ke ĉiu sendaĵo estu kontrolata.

Persona noto: Reklamoj por grupkorespondado en la Esperanta gazetaro ŝajnas al mi iom hazardaj. Mi sentas, ke la ideo indas oficialan subtenon de la landaj instruistaj asocioj kaj ke ĉiu asocio devus elekti peranton, kiu kolektos la nomojn de interŝanĝvolontuloj.

La kunveno poste diskutis pri la problemo de la junuloj 15-20-j., kiuj lernis Esperanton en la lernejo kaj poste forlasas ĝin. Tio plej ofte okazas. S-ro Hamilton diris, ke estas afero, ĉu oni sufiĉe kaptas la intereson de la infanoj en la lernejo. Li antaŭvidis la enkondukon de Esperanto en la temaron de la novaj Provincaj Lernejoj (County Colleges) en Anglujo. Kiam la plano efektiviĝos, la partotempa ĉeesto de ĉiu junulo 15-18-jara estos deviga.

F-ino N. Rees (Kimrujo) trovis, ke Internacia Junular-Kunveno estis la plej grava instigo al daŭra interesiĝo pri Esperanto. Tiurilate s-ro Lentaigne konsilis la starigon de ŝparkaso por vojaĝado por la infanoj. Ĝi donas **celon** al monŝparado kaj ankaŭ kreas la **emon** kaj la **eblecon** vojaĝi.

S-ro M. Schmidt (Konstanz, Germanujo) diris, ke junuloj devas havi instigan celon por rekompenci ilin por la stud-laboro.

(La redakcio kore dankas s-ron Watson (Brit.), kiu faris la supran protokolon.

Atentu bone: De la Instituto de Esperanto-Servo en Praha mi ricevis broŝuron, tre legindan: „Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio”. Ĝi estas senpage ricevebla ĉe: Instituto de Esperanto-Servo, Malá Štěpánská str. 7, Praha II, Ĉ.S.R.

Bonvolu peti alsendon, gekolegoj!!!

Ĉu Esperanto aŭ rusa lingvo?

La hungara Publikopinion Esploranta Instituto en Budapeŝto aperigis la rezulton pri la ronddemando, kiajn lingvojn oni instruu en la lernejoj. Oni konstatis, ke la intereso por la rusa lingvo tre vigliĝis, sed **ĉiu dudeka** el la gepatroj deziris aŭ proponis la instruadon de Esperanto. La hungara ĵurnalo **Szabad Nép** aperigis artikolon el rusa gazeto, en kiu profesoro, sub influo de la granda intereso de la publiko por la rusa lingvo en la orientaj landoj, pritraktas la temon, ĉu la rusa lingvo estas taŭga internacia lingvo, kiun demandon li jese respondas. Ĝi efektive jam funkcias tiel por la multaj diverslingvaj kaj diversrasaj nacioj kaj nacioj en Sovjetio. Kompreneble la plimulto de la popoloj, precipe la laboristaro — eĉ se estos deviga lerneja instruado — ne ellernos la rusan lingvon, do por la uzo de Esperanto restos sufiĉe da tereno kaj okazo. Interese, ke la latinan lingvon nur tre malmultaj deziras.

P. Balkanyi.

Subtenu la Internacian Junularlaboron. Varbu abonantojn por „La Juna Vivo”!



Parto el ge-partopreniĵoj en la TJO-Kunveno en Versailles antaŭ la urbdomo en Parizo.

Karaj Lerneĵoj,

En la antaŭa numero ni petis vian opinion pri „La Juna Vivo”. Mi petis: „Bonvolu skribi, kio plaĉas al vi kaj kio ne plaĉas al vi.” Sed — ho ve! Ni ne ricevis respondon. Ĉu el tio ni devas konkludi, ke ĉio plaĉas al vi? Aŭ ĉu nenio? Ni ne scias!

En ĉi tiu numero vi inter alie trovos interesan „tekstaĵon” el Bulgarujo. Ni tre scivolas, ĉu vi trovos la frazojn en ĝi! Ĉu vi skribos pri tio? Ankaŭ tre bona ekzerco estas fari frazojn ĉe la bildoj en „NIA VERKILO”. Kiu faras tion? Estos interese, se vi sendos tiujn frazojn al ni. Tiam ni scios, kiuj el vi estas fervoraj esperantistoj.

Vi ja scias la redakcian adreson: TJO-Centro, West-Graafdiĵk, Nederlando.

Pri interesaj leteroj ni raportos en venonta numero.

Denove ni atendas viajn sendaĵojn!

N. K.

Scivola!

Johano: Kion vi portas en tiu pakaĵo, Petro?

Petro: Kial vi volas scii tion?

Johano: Vi estas tre scivola, ĉu ne?


NIA VERKILO.

Ĉu dorm-ej-o??

Ĉu lern-ej-o??

Pri ĉi tiuj bildoj vi povas verki multajn frazojn!


Ĉe la unua bildo mi skribas la komencon de kelkaj frazoj. Ĉe la aliaj mi skribas nur kelkajn vortojn kaj la frazojn vi devas fari mem.



1.


Faru ankoraŭ kelkajn aliajn frazojn. Pensu pri: ĉapelo, surtuto (mantelo), nigra vesto, blanka tuko.

Du viroj estas sur la bildo.
Unu el ili
La alia viro
La viro antaŭ la tablo
(ĉu li skribas??)
En la manoj
Sur la tablo staras
La nomo de la ĉambro estas



2.

La nomo de tiu ĉambro estas
Faru frazojn, kaj pensu pri: kurtenoj, fenestro, bildo sur la muro, lito sur la planko, knabo en la lito.



3.

En la lernejo:

La instruisto staras antaŭ tablo.
La nomo de la tablo estas: **pupitro**.

Kaj nun vi respondul!




4.

Ĉu tio estas lernejo?
Kion la knaboj faras?
Ĉu knabinoj estas sur la bildo?
Ĉu ili ludas per pilko? Ĉu per ŝnuro?

Karaj geamikoj, vi faris multajn, bonajn frazojn. Sed mi ne vidas ilin. Ĉu vi volas sendi ilin al la redakcio de „La Juna Vivo”? Skribu vian adreson kaj — „mi estas knabo (knabino) jara.”

Kio estas tio???



Ni ricevis tre interesan „teksaĵon” el Bulgarujo. Ĝi ne konsistas el fadenoj, sed el literoj. Se vi tenas la bildon proksimume horizontale ĉe la bazo de viaj okuloj, kaj fermas unu okulon, vi vidos literojn, kiuj formas vortojn. Tiam turnu la bildon iom maldekstren por legi la daŭrigon. Entute vi trovos 10 vortojn en tri vicoj.

Sukceson!!!


En la venonta numero ni publikigos la tekston.

Nederlanda salo.

En ĉiu maro troviĝas salo. La riveroj portas tiun salon en la maron. Tio jam okazas dum milionoj da jaroj. La akvo de la maroj fariĝas vaporo, sed la salo restas.

En Portugalujo kaj aliaj varmaj landoj oni plenigas laĝetojn per marakvo. Tie estas pli varme ol ĉe ni. Do la akvo vaporiĝas kaj la salo restas en la laĝetoj. Oni bone sekigas la salon, purigas kaj vendas ĝin. Holandaj ŝipoj jam antaŭ centoj da jaroj portis tiun salon el Portugalujo al multaj landoj en Eŭropo.

Peklakvo



Tiel ni en Nederlando ne povas akiri salon. Pluvas tro multe kaj ne estas sufiĉe varme.

En la jaro 1885-a viro faris pumpilon apud Delden, vilaĝo en la orienta parto de Nederlando. Kiom li miris, kiam la akvo kiu venis el la pumpilo, estis sala! La tero enhavis salon.

En 1918 oni en nia lando ne povis aĉeti salon, pro la milito. Tiam oni rememoris la viron el Delden kaj trovis multan salon en la tero. Bedaŭrinde ĝi estis tre profunde. Vidu la desegnon.

Oni boris en multaj lokoj kaj fine trovis la plej bonan lokon apud la vilaĝo Boekelo (prononcu Bukelo). Sed kiel oni povis elpreni tiun salon?

Oni faris en la teron longan, feran tubon. En tiu larĝa tubo oni mallevis mallarĝan tubon. En la ringforma spaco inter ambaŭ tuboj oni pumpis akvon. La akvo tuŝas la salon, kaj tiu salo solviĝas en la akvo. Oni pumpas la akvon supren kaj ĝi fluas al la fabriko, kie oni vaporigas ĝin. La salo restas.

Tiel oni gajnas multan salon en Boekelo, sufiĉe por la tuta nederlanda bezono. Kaj oni

povas ankaŭ vendi multe da salo al aliaj homoj en aliaj landoj.

Oni faris en Boekelo banejon kun sala akvo kaj veraj ondoj. La banejo ŝajnas marbanejo.

La infanoj de la elementa lernejo en Edamo.

Koko kaj kokino.

La koko elkrias
matene, kaj penas
aldiri al homoj,
ke tago alvenas.

La bona kokino
fiere kluketas
kaj por la infanoj
la ovojn demetas.

Nenjo Rimanto (kopirajto rezervita).

Junularo, laboru por via propra organo! Sendu interesajn artikolojn!

Du malgrandaj grajnoj de tritiko.

(Por siaj lernantoj verkis Lauri Lehtola).

Du malgrandaj grajnoj de tritiko kuŝis dum la vintro en mal-luma kestego de grenejo. Ili kuŝis tie kun multaj, multaj aliaj mal-grandaj grajnoj kaj ĉiuj dormis dum la longa, longa vintro.

Kiam venis la printempo kaj la suno staris pli alte sur la ĉielo, la grajnoj unu post la alia vekigis. Ankaŭ la du grajnoj, pri kiuj mi volas rakonti al vi. Eble unu sunradio ĝuste eniris tra la ŝlosil-truon kaj ĝi flustris en iliaj oreletoj:

„Vekiĝu, Spiko kaj Burĝono! Vekiĝu! Via vico nun venis por kunporti vian trunketon en la komunan stakon!”

En la grenujo estis ĝojaj flustrado kaj susuro. Ĉiuj grajnoj maldormis. En angulo sidis araneo, por ĉasi. Ĝi riproĉe rigardis al la kestego de la grenejo, ĉar ĝi amis la silenton. Sed la grajnoj sciis, ke ili ne ekzistas por la araneo. Tial ili tute ignoris la araneon.

„Ĉu vi jam maldormas, Burĝono?” flustris Spiko al sia kunulo.

„Ĉu estas vi? Ĉu vi kredas, ke ni kune povos ekkreski kaj produkti en la humo de la tero, kiel ni kune dormis en ĉi tiu kestego? Mi esperas, ke jes! Ĉu ankaŭ vi esperas tion, Spiko?”

„Jes, ankaŭ mi esperas tion,” flustris Spiko. Kaj ĝi pensis, ke estos tre bone, ĉar Burĝono ŝajnas tre ventanima.

Okazis laŭ la deziro de Spiko kaj Burĝono. En iu posttagmezo venis la farmisto en la grenejon kun semujo en la mano. Li plenigis la ujon per grajnoj de tritiko kaj iris al la kampo. Ankaŭ Spiko kaj Burĝono estis en la ujo. Ĉe la kampo la farmisto haltis kaj metis la ujon sur la teron. Li komencis serĉi inter la grajnoj kaj forĵetis kelkajn malproksimen, en ŝlimakvejon.

„Tiuj ne taŭgas, el ili kreskos nenio.” Tiel parolis la farmisto. Tiam li prenis la semujon kaj komencis semi la bonajn grenerojn.

Burĝono kaj Spiko venis en la teron, unu apud la alia.

„Rigardu, Spiko! La blunon de la ĉielo! Kiel bela ĝi estas! Rigardu mian gracian tigon! Ĉu ĝi ne estas ĉarma? Estas agrable vivi!”

Estas daŭrigota.

Ĉiam 1089.

Ĉiam 1089! Tio similas sorĉon! Sed ni vidu.

Ni skribu nombron de tri diversaj ciferoj, ekz.: 561, 247, 859 k.t.p. Nu, ni elektu 348. Poste ni faru la nombron kun la samaj ciferoj, sed laŭ la inversa sinsekvo. Nia nova nombro sekve, fariĝas 843. Ĉu vi komprenas? Unue 348, nun 843. Ni subtrahu unu de

la alia. Do 843—348. Tio estas 495. Ĉi tiun nombron ni turnu sammaniere. Ĝi fariĝas en nia kazo 594. La du novajn nombrojn ni sumigu. Tiel! 495 + 594. Kaj tio ĉi fariĝas 1089.

561, 247, 859, 632, 789, 123, 915 kion ajn ni prenu, se ni kalkulas laŭ la sama maniero, ĉiam ni ricevos 1089.

Ĉu tio ne estas mirinda?

Kiu el vi klarigos la miraklon?

Rogiero.

Tro bona!

Patrino: „Ho, mia kara fileto, kiom malbonan lernejan ateston vi havas!”

Filo: „Sed la instruisto diris, ke ĝi estas tro bona por mi!”

Anekdoto pri Shaw (elparolu: ŝo).

Vizitanto: Kaj, s-ro Shaw, ĉu vi estas vegetarano?

Shaw: Jes, sinjoro.

Vizitanto: Ĉu pro tio, ke vi tiom amas bestojn?

Shaw: Mi estas vegetarano ne pro tio, ke mi tiom ŝatas vivantajn bestojn, sed pli pro tio, ke mi tiom malŝatas senvivajn bestojn.

Trompaj nomoj.

En riz-papero ne estas rizo. Oni fabrikas ĝin el la medolo de arbo. Tiaj arboj kreskas en Formoso.

En sodo-akvo ne estas sodo, sed nur karbon-acida gaso.

La panamajn ĉapelojn oni fabrikas ne en Panamo, sed en Ekvadoro.

En ĉamo-ledo estas eĉ ne unu ero de ĉamo. Oni faras ĝin el la karna flanko de ŝafa haŭto.

En kamel-hara broso ne estas eĉ unu haro de kamelo. Ĉiuj haroj devenas de sciuroj.

La „kvar elementoj”: fajro, akvo, tero kaj aero estas ne elementoj, sed kunmetaĵoj.

Geknaba Konsilantaro.

En la urbo Cleethorpes estas Geknaba Konsilantaro. Oni fondis ĝin antaŭ tri jaroj ĝi kunvenas sesmonate.

Ĉiu lernejo en la urbo elektas du aŭ tri reprezentantojn kaj la

urbestro funkcias kiel prezidanto. Ĉeestas ankaŭ tri aŭ kvar prezidantoj de urbkonsilantaraj komitatoj kaj la urbskribisto.

La procedo estas tre simpla, sed tre interesa. Ĉiu komitata prezidanto laŭvice klarigas la funkciadon de sia komitato. Poste la geknaboj faras demandojn. La protokola libro de la konsilantaro montras, ke la demandoj de la geknaboj detale malkaŝas la funkciadon de la Urbkonsilantaro. Sendube la geknaboj lernas multon pri la urbaj aferoj.

La kunvenoj okazas en la Konsilĉambro de la urbdomo. Kelkaj gepatroj kaj geïnstruistoj kun plezuro kaj intereso aŭskultas.

Eble kelkaj el la junaj konsilantoj iam fariĝos urbkonsilantoj aŭ eĉ urbestroj.

F. B. H., Britujo.

ENIGMOJ.

Ni ne proponas premiojn por enigmoj, sed vi tamen sendu viajn provojn al mi. Ni donos poentojn. Post iom da tempo vi legos viajn nomojn en „La Juna Vivo” kaj ankaŭ la nombron da poentoj, kiujn vi gajnis.

En „Juna Espero” por julio-aŭgusto mi raportis, ke 37 legantoj solvis la enigmojn. Ĉi tiun fojon mi ricevis nur DU!

Kial? Eble vi tro ĝuis la someran libertempon?

Espereble mi la proksiman fojon povos raporti, ke vi denove laboras!

Kun ĉiuj bondeziroj, T. K. Slade.

1. **Faru vian propran krucvortenigmon.** Desegnu kvadraton el 25 ĉeloj. Metu ĉe la ĉeloj de la supra flanko la literojn A, B, C, D, E. Ĉe la maldekstra flanko vi metu, de supre malsupren, la ciferojn 1, 2, 3, 4, 5.

(r) signifas, ke oni nur skribu la radikon de la vorto.

Indikiloj horizontalaj:

Indikiloj vertikalaj:

1a-1e: pasinta parto de ĉi tiu jaro(r).

A1-A4: ĉiel simila.

2b-2e: besto, kiu saltas.

B1-B3: valora metalo.

3a-3d: sur ĝi ni ĉiuj vivas(r).

B4-B5: dufoje la sama litero.

4a-4b: ofta prepozicio.

C1-C3: korpoparto(r).

5a-5e: Krii kiel besto.

C4-C5: supozata vorto.

D1-D2: prepozicio.

D3-D5: numero.

E1-E5: fari pecojn.

2. Se vi ŝanĝas ĉiam nur unu literon, vi povas ŝanĝi la radikon MAN- en la radikon PET-. Tiel: MAN-, pan-, pat-, PET.

Same: KOR-, kot-, kat-, RAT-.

En simila maniero vi nun ŝanĝu RAT- en SON-, SUN- en LIM-, TAG- en PIN-, VID- en RAP-.

Ensendu vian provon antaŭ la 20-a de novembro al s-ro T. K. Slade, 7 Southview Road, Southampton, Anglujo. (Klare aldonu viajn aĝon kaj adreson).

POŝTMARKORUBRIKO.

Nia nova rubriko sukcesas. En tri tagoj post la apero de nia gazeto la libroservo ricevis ses leterojn kun poŝtmarkoj.

Ni dankas vin, J. Ericke, Hans Dost, J. Meerbach kaj Kees Baden el Bergen op Zoom (Ned.). Vi petis poŝtmarkojn el Svisujo, Polujo kaj Hispanujo. Ni esperas akiri ilin por vi. Legantoj el Svisujo, Polujo kaj Hispanujo, helpu nin. Ankaŭ de s-ro A. B. Morgan el Birmingham (Angl.), s-ro H. Siemens el Togeretz (Germ.) ni ricevis multajn p.m. Ni certe respondos al vi. Multan dankon. Ĉu vi ĉiuj ankoraŭ scias nian aranĝon? Kiu havas tro multe da poŝtmarkoj de sia propra lando, sendu ilin al la Libro-Servo de TJO, kun respondkupono, kaj petas p.m. el aliaj mondpartoj, landoj k.t.p. Se la libro-servo posedas la deziratajn p.m., ĝi tuj sendas ilin. Sed — paciencu. Por la plej bela letero, en kiu vi skribas ion pri p.m. ni donacos 100 nederlandajn p.m.

Jus la poŝtisto alportis keston kun 10.000! nederlandaj p.m. Bedaŭrinde mi ne konas la sendinton. Tamen ankaŭ al li: multan dankon!


Libro-Servo TJO, Voorhaven 80, Edam, Ned.

SKOLTA RUBRIKO.

Kara frat(ino).

Se vi abonas la gazeton „La Skolta Mondo” vi jam delonge legis artikolon pri internaciaj rotoj kaj certe vi tuj komprenis tiun intereson.

Sed eble tio ne okazis, do mi petas vin pripensi tiun aferon. La Skolta Esperantista Ligo estas certe grava rimedo por disvastigi la skoltajn ideojn per Esperanto kaj Esperanton inter geskoltoj. En la mondo estas multaj skoltoj, kiuj partoprenas siajn asocian kaj trupan vivojn. Sed aliaj skoltoj kaj sim-



Esperanto kaj Esperanton inter geskoltoj. En la mondo estas multaj skoltoj, kiuj partoprenas siajn asocian kaj trupan vivojn. Sed aliaj skoltoj kaj sim-

patiantoj neniel povas partopreni tiun vivon. Eble pro malfavora medio aŭ pro la malpermeso de skoltismo en la lando. Tiuj ne povas peti partoprenon al Skoltismo. Sed kvankam ili ne povas esti anoj de oficiala asocio, oni povas inviti ilin al rota vivo per leteroj.

Jen la celo de Internaciaj Rotoj: skribi kaj peti por trovi tiajn junulojn kaj partoprenigi ilin en iu roto. Tial mi skribas ĉien, mi paroligis per la franca radio, tial mi sendis artikolon al la skolta gazeto kaj tial mi skribas ankaŭ por vi.

Do atentu tion, kaj partoprenu en iu roto. Aŭ formu roton kun geskoltoj, kiujn vi serĉos en la tuta mondo. Vi estos tute libera gvidi ĝin, sed finfine vi kunlaboru kun jam vivantaj rotoj.

Jam unu roto vere vivas. Ĝi konsistas el ok geskoltoj el kvin landoj Dua roto pretiĝas

La rota lingvo estas Esperanto, ĉar estas malfacile trovi skoltojn kiuj scipovas la saman lingvon.

Nu, bone pripensu, geamikoj, kaj mi atendas baldaŭan respondon. Sed kia ajn ĝi estos, estu certaj, ke mi kore restas via

Jean Louis Texier S.F.D., 278 Av. Daumesnil, Paris XII, Francujo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino A. Kaagman, Voorhaven 80, Edam, Nederlando).

Nederlando: Pro personaj cirkonstancoj Henk Uittenbogaard ne povis resti ĉefperanto. Ni tre bedaŭras tion, ĉar Henk faris bonan laboron en la nederlanda sekcio. Pro ĉio, kion li faris, ni elkore dankas lin. La nova, provizora ĉefperanto estas Ko Wallenburg, Lobeliestr. 4, Hilversum.

Ĉar ankaŭ aliaj estraranoj de la ned. sekcio ekŝiĝis en la pasinta jaro, oni formis tute novan estraron. Ĝi konsistas el: Koos Jonker (sekretario), Theo Knegt (kasisto), Aris Blauw (gazetarservo), Rika Leegwater (asesorino).

TJO-Kunveno 1950: Ĝi okazos en Konstanz apud Bodenlago en la suda parto de Germanujo. Miŝel Smit jam akiris la oficialan permeson de la milita registaro kaj jam ellaboras bonan planon. Espereble ni en la venonta numero povos doni pli detalajn informojn. La regiono estas belega: ni povos fari belegajn ekskursojn, do — jam ŝparu!!!

GENERALAJ INFORMOJ.

Radio-Parizo: Ekde la 2-a de oktobro la elsendoj okazos sur nova mallonga ondo: 48 m 82, aŭ 6.145 Kc. — La tempo restas de la 18-a h. kaj 15 min. ĝis duono post la 18-a h.

Aŭstralia Esperanto-Konferenco okazos de la 3-a ĝis la 7-a de januaro 1950 en Melbourne. En la kadro de la konferenco okazos granda ekspozicio

por la ne-esperantista publiko. Tiucele oni sendu materialon: salutleterojn, ĉ. poŝtkartojn, rimsalutojn, reklamojn, ktp. La plej bona sendaĵo estos premiata per „Leteroj de Zamenhof”.

Oni petas tujan alsendon, ĉar ordinara letero bezonas du monatojn por atingi Aŭstralion. Adr. de la konferenca sekretario: Herbert Koppel, Postbox 2122, T. Elizabeth Street, Melbourne, Aŭstralio.

Lingvaj institutoj interesiĝas pri esperanto. Pluraj lingvaj institutoj jam envicigis Esperanto-kurson en siajn kurso-seriojn. Tiel ekde sept. 1949 aranĝas skriban Esperanto-kurson por komencantoj la nederlanda lingva instituto kun la anglalingva nomo „The English Institute” (dir. s-ro A. C. Rijnberg), Parklaan 37, Bussum (Ned.).

Kompilinto kaj gvidonto de la kurso estas s-ro S. S. de Jong Dzn., Tjerkerwerd 48 (Fr.), Nederlando.

Internacia Junulara Laborbrigado. Junaj ĉeĥoslovakaj Esperantistoj invitas junajn gesamideanojn el ĉiuj landoj partopreni en la somero de 1950 internacian junularan laborbrigadon en la slovakaj montegara regiono Altaj Tatroj. Vi trovos agrablan medion, bonajn laborkondiĉojn kaj riĉan programon kulture kaj amuzan. Ni antaŭe atentigas vin, por ke vi povu jam anonci vin al nia centro. Se vi faros tion baldaŭ, vi bone helpos plifaciligi multajn problemojn. Ni ĝojas je samideana kunlaboro kun vi.

Junulara fako ĉe Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, poŝt. sch. 7075, Ĉeĥoslovakujo.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

„**Leteroj el mia muelejo**”, verkita de Alphonse Daudet, el la franca lingvo tradukita de Mijake-Sihej; eld. de Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1-13, Tokio; 80-p. malgrandformata libreto; prezo 0,40 dol. — La libreto enhavas trionon de la konata franca libro, kaj ĝi estas la unua kajero en nova japana serio „Internacia Biblioteko de JEI.”

„**Ecco l' Esperanto**”, esperanto-lernolibreto por italoj, verkita de Mario Guzzi, eldonita de „Verda Steleto”, Torino, Italujo.

„**Almelo**”, Pleisterplaats voor Twente”, ilustrita faldprospekto en kvar lingvoj. Ĉiujn informojn donas la informejo por Fremdultrafiko, Grotestr. 80, Almelo, Nederlando.

„**Koran bonvenon en Graz!**”, okaze de la Aŭstria Esperanto-Kongreso, 16-20 julio 1949. 14-p. ilustrita broŝuro, aĉetebla por 1 resp. kup. (aŭ interŝanĝe kontraŭ esperantaĵoj) ĉe Stiria Esperanto-Centro, Graz, Sackstr. 16/1, Aŭstrio.

„**Köge, Danlando**”, ilustrita faldprospekto pri la urbo Köge, senpage akirebla ĉe Turistforeningen, Köge, Danujo.

„**Taglibro de Kongresano**”, kun vortlisto, eld. de Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-kä; 24-p. broŝurita libreto (kun aparta vortlisto), prezo neindikita. La libreto estas la 3-a ekz. en la serio „Rekta Vojo al Lingvoscio”.

KORESPONDADRESOJ

Bulgarujo: Spas K. Ivanov (17-j.) v. Popovo, Novo Zagorsko, deziras korespondi kun la tuta mondo. Respondo garantiata.

Ilia Georgiev pop Panajotov, Samovodene, V. Parnovsko, 23-j., dez. kor. kun gejunuloj el la tuta mondo. Respondo certa.

Ĉeĥoslovakujo: Vladimír Šlosar, 15-j. studanto, Neslovce 138, p. Tetcice u Brna, dez. kor. per let. aŭ poŝtk. Interŝ. pm: Resp: certa.

21-j. stud. de paperfaklernejo dez. kor. en esp., germ.; rusa kaj nederl. lingvoj k.l.t.m. Pfleger F., S.O.S.P., Hostinné/L:

Jaroslav Becka, Pysely apud Praha, dez. kor. kaj interŝ. poŝtk. kaj poŝtm. kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

Francujo: S-ro Retot, 18 str. Butte aux Cailles, Parizo 13, dez. korespondantojn el la tuta mondo por siaj lernantoj-komencantoj (11-13-j.).

F-ino Yvonne Belhomme, 3 rue Dom Calmet, Nancy (M et M) dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, kaj interŝ. poŝtmarkojn.

S-ro Mourlon, 116 rue Charles Keller, Nancy, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, kaj interŝ. poŝtmarkojn. Respondo certa.

Germanujo: Ewald Ebmeier, (21a) Bünde (Westf.), deziras korespondi kun junaj nederlandaj gekamaradoj.

F-ino Roswitha Müller, Dresden-A 34, Tharandter Landstr. 28, 18-j., dez. kor. kun gek-doĵ el Hungarujo, Hispanujo, Anglujo, Finnlando, k.s.

19-j. ministro dez. kor. kun aliaj junaj laboristoj el ĉiuj landoj. Adr.: Heinz Heyroth, 19a Eisleben, Lutherstadt, Rathenaŭstr. 8.

Specialisto por Esperanto-specialstampoj (poŝte uzataj ĉe E-kongresoj) serĉas kontakton kun alilandaj samfakaj kolektantoj Michel Schmidt, (17b) Konstanz, Grüngang 9.

Hungarujo: 15-j. komencantino dez. kor. kun gejunuloj en Nederlando, Danujo, Svedujo, Svisujo, Ameriko. Agnes Karcos, Pesthidegkut; Ady Endrestr. 167.

Irlando: S-ro Patrick Lynch, 40-j., dez. kor. per ilustritaj poŝtkartoj. Respondo certa. Adr.: Murroe P.O., Limeiek.

LA TJO-LIBRO-SERVO

ĉiam pretas servi al vi, do nur mendu!

Ĉu vi jam propagandas per nia flageto? Prezo nur 1.— guld.

TJO-poŝtpapero:

50 fôlioj k. 50 kovertoj: 2 guld.

50 poŝtkartoj: 0,75 guld.

Binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo“ (aĉetebblaj de la jaroj '34/'35, '35/'36, '36/'37), interesa legaĵo por komencantoj kaj progresintoj. **Prezo po 1.— guld.**

Ĉe ĉiu mendo oni bonvolu pagi 10 % por la sendkostoj.

TJO-Libro-Servo, Voorhaven 80, Edam, Ned.

KURSGVIDANTOJ! Bonegan materialon vi trovas en la de **J. Muuses, Purmerend**, eldonitaj lernolibroj:

Internacia Lernolibreto „La Juna Vivo“ 0,50 gld.

Apartenanta vortlisto (speciale por nederlandanoj) 0,15 guld.

„Sub la Verda Standardo“ (plena metodo, konsistanta el: **Gvidilo** (nur por la gvidanto) ... 2,50 gld.

„Laboriloj“ I kaj II, po 0,90 „

„Memorigilo“ „ 0,50 „

Mendu ĉe la TJO-Libro-servo, Voorhaven 80, Edam, Nederlando.